

& Pala procesio:

< Rekante 12 el 23 batoj por strofo, entute 690 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis K. Kalocsay (Streĉita kordo, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (/Mi DoDo MiMi DoMi FaMi ReeRe;Re SoSo LaLa Tido TiLa SoSo;

(#Rekantaĵe: Mi DoDo MiMi DoMi FaMi Re; SoSo La TiSo MiRe Do o)

)×30)+

(&Strofoj:

'1 Ho, procesio de knabinoj palaj: ; Vizaĝoj flavaj kaj malĝoj-vualaj.

(×: **Dum en la kampoj kreskas heliant' ; ankaŭ ĝi velkas en aŭtun'.**)

'2 En la sunbrilo de l' somer-maten' ; Vi marŝas, marŝas kontraŭ tag' de pen'.

'3 Atendas vin la kor-muelaj horoj ; En la fabrikoj kaj en la kontoroj.

'4 En lit' ĉifita restis la fiktiv' ; De l' dolĉaj sonĝoj... Jen la viv' — la viv'!

'5 Funebra, longa, longa procesio ; Je l' enterigo de la iluzio,

'6 Je l'enterig' de ĝojo kaj de ĉarm': ; Vidante vin mi luktas kontraŭ larm'.

'7 La bruston peza vivo senkompata ; Jen premas plata, senespere plata,

'8 Ĝi klinas dorsojn, ŝtelas el rigard' ; La artfajraĵon de la juna ard'.

'9 Sur la vizaĝoj sidas trajt' enua ; Kaj ĉe l' okuloj jam sulketo frua,

'10 Sopiroy kuŝas en la kor' kun sven', ; Sub pezaj ŝtonoj de la taga pen'.

'11 Ho, orfaj floroj de l' ĝarden' de Dio, ; Vin ne vizitas gaja papilio,

'12 La papilio de la hor' de am'... ; Burĝone velkas via florornam'.

'13 Ho kiel volus mi kun krio voka ; Elŝiri vin el brak' de l' urb' sufoka

'14 Kaj gvidi vin en kanta, danca rond' ; Sur la deklivon de sunbrila mont'.

15 Sur viajn harojn ŝuti kampoflorojn ; Kolorojn pruntu ili kaj odorojn.

'16 Rigardojn viajn ĵeti al ĉiel': ; Sin banu ili en la blua hel'.

'17 Kaj vin aspergi per radioj sunaj ; Vin ili kisu sanaj, ruĝebrunaj.

'18 Stariĝi sur la pinto de l' dekliv' ; Kriante: iru, ĝoju al la viv'!

'19 Kaj pluv' de ĝojo el ĉiel' sennuba ; En brusto seka, sarkherbaĵa, duba

'20 Ĝermigas riĉajn spikojn de la fid', ; Sonorilflorojn de l' perlanta rid'.

'21 Vi dancas, sur la kapoj kun festonoj, ; Turnante ronde vin je flutosonoj.

'22 Dum tikle, dolĉe vibras en la spin' ; La ebrieto pro l' miela vin'.

'23 Aŭ vi sur branĉoj vin balancas kuŝe, ; Fruktsukojn dolĉajn sorbas plenabuŝe,

'24 Ĝis vin al sorĉaj kampoj logas for ; La papilio de la ama hor':

'25 Pel-ludi, rifuĝante de l' sopiro, ; Petole kiel nimfo kun satiro,

'26 Spirege fali kaj kun ĝoja trem' ; Kapitulasi al la ĉirkaŭprem',

'27 Dum viajn kisojn per foli-susuro ; Flustrate benas la Patrin-Naturo...

'28 Ho plen' de l' vivo! Ho triumfa Jes! ; La viv' Donaco estas kaj Promes'!

'29 Ekpalas, falas, mortas iluzio ; Kaj marŝas, marŝas pala procesio...

'30 Okulangule gutojn du de plor' ; Mi viŝas honte, kun senpova kor'.)